Nro 5 +

Pola Esperantisto

XXXI JARO — MAJO 1937

Esperantysta Polski

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
REDAKTANTOJ REDAKTORZY PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI

APERAS LA 1-an DE ĈIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI ĜIS LA 20-a DE ĈIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAŬ BEZONO ŜANĜI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

VARSOVIO

LA URBO DE NIA JUBILEA KONGRESO.

Okuloj de la tutmonda esperantistaro estas direktataj al Varsovio, la ĉefurbo de Polujo, kiu ankaŭ ĉi-jare estas ĉefurbo de la vasta kaj bela Esperantujo. Ja en tiu ĉi urbo okazos nia Jubilea Kongreso, solena kaj impona festo de la kvindekjaro de Esperanto. Tial ni konatiĝu kun Varsovio, kiu jam laŭte vokas:

BONVENON AL LA TUTMONDA SAMIDEANARO!

Multaj jarcentoj pasis de tiu tempo, kiam ĉe la bordo de la larĝa kaj bela Vistulo trafluanta la marĉ- kaj arbarriĉan Mazowsze (elp. Mazovŝe) ekkonstruis siajn kabanojn la unuaj fiŝkaptistoj. Kaj verŝajne de la nomo de tiu unua fiŝkaptisto, kiu ekkuraĝis ekloĝi sur abrupta bordo de Vistulo — Warsz (elp. Varŝ), mallongigo de Wartisław, ricevis sian nomon la ĉefurbo de Polujo Warszawa (elp. Varŝava). Antaŭe certe estis Warszowa, ĉar la finaĵo „owa" signifas apartenon, tial latine estas „Varsovia" ne „Varsavia".

Varsovio ne apartenas al la plej malnovaj urboj de Polujo. Jam de longe ekzistis Poznań, Krakovo kaj aliaj urboj, sed sur la lokoj de la nuna pola ĉefurbo ankoraŭ kreskis densaj arbaregoj, kie regis ursoj kaj uroj.

La unuan mencion pri Varsovio ni trovas en la jaro 1251 en la dokumento de Poznań'a episkopo Boguchwał. Sed tamen, jam tiam ekzistis duka kastelo kaj preĝejo. Efektive la urbo estas ekkonstruita en la jaro 1254.

Troviĝinte en tre favoraj geografiaj kondiĉoj, en la preskaŭ geometria centro de la lando, kie trafluas la plej gravaj kaj sekve komercaj vojoj, Varsovio posedis ĉiujn necesajn kvalitojn por fariĝi la ĉefurbo. Sed limigita per preskaŭ netraireblaj marĉoj de la altaj partoj de la lando, Duklando Mazowsze estis multe malfruiĝinta en sia kultura disvolvo. Ja la civilizigo fluis el la sudo, de la bordoj de la Nigra Maro, laŭlonge de Karpatoj. Tio estis la vojo de aziaj komerco kaj influo. La kulturo de Mediteraneo-landoj enpenetris potence tra Bohemia Pordego (inter Karpatoj kaj Sudetoj). Grandan signifon havis ankaŭ la normandia kulturo je Po-

meranio. Mazowsze malgraŭ sia centra situo, estis for dum longa tempo de diversaj kulturaj influoj. Tial ni ne miru, ke Mazowsze ne trapasis periodon de la humanismo kaj reformacio, kaj en arĥitekturo ni ne trovas restaĵojn de la originala renesanco, tiel abundajn en Poznań kaj Krakovo, sed nur gotikon kaj barokon.

Eksterlande oni aŭdis pri Varsovio la unuan fojon en la jaro 1339, kiam Polujon venis specialaj delegitoj de l' Papo por juĝi la kruckavalirojn. De tiu tempo Varsovio komencis rapide disvolviĝi, sed ĝi ricevis signifon de la ĉefurbo de Polujo nur en 1569, kiam Sejmo (parlamento) Lublina fiksis ĝin kiel sidejon de Sejmoj de Polujo kaj Litovujo. Tamen formale kaj fakte la ĉefurbo de Polujo estis ankoraŭ Krakovo. Nur en 1596 la reĝo Sigismundo III translokigis la ĉefurbon el Krakovo Varsovion. Laŭ lia ordono anstataŭ malgranda modesta rezidejo de iamaj dukoj de Mazowsze oni konstruis la reĝan kastelon, ĝis nun ekzistantan, (nuna rezidejo de la Prezidanto de Pola Respubliko). En la sama tempo estis konstruitaj aliaj multaj belaj palacoj. Tiam gravan signifon havis jam la urbanaro kaj de tiu ĉi epoko devenas malnova parto de la urbo kun granda placovendejo, Rynek, borderita de belaj karakterizaj domoj.

Sed venis la jaro 1655, jaro de „Diluvio" priskribita de la fama pola verkisto Henryk Sienkiewicz, kiam la ĉefurbon okupis svedoj kaj kiam multaj trezoroj estis forrabitaj kaj palacoj ruinigitaj. Dum pluaj jaroj Varsovion okupis jen sveda jen rusa militistaroj, kio kompreneble malbone influis la staton de la urbo.

Venis la epoko nomita Saksa. Lukso de la reĝa kortego restigis multajn valorajn memorajojn, interalie palacon, ĝardenon Saksan kaj placon (nuna placo de Marŝalo Józef Piłsudski). Tiutempe disvolviĝis diversaj belartoj. En 1746 estis fondita biblioteko de fratoj Załuski, enhavanta 300.000 volumojn. En la sama periodo ekaperis la unuaj gazetoj.

Post granda brulego de Varsovio en 1769 la reĝo Stanislao Aŭgusto Poniatowski rekonstruigis la palacon en belega Łazienki (la plej granda parko en Varsovio — 66 ha), kies salonoj estis pentritaj de la fama Bacciarelli. Samtempe oni konstruis teatron sur insulo, kie ĝis nun de tempo al tempo okazas teatro-prezentadoj. El la norda flanko de la palaco la perspektivon fermas bela monumento de la reĝo Johano Sobieski, ĉizita de Pink.

De la jaro 1796—1806 Varsovio apartenis al Prusujo, poste okupis ĝin la armeo de Napoleono. Tiu ĉi periodo postlasis nenion rimarkindan. La Viena Kongreso, okazinta en 1814, fiksis la Polan Reĝlandon. Tiutempe oni multe beligis la urbon, oni faris multajn konstruaĵojn, interalie Belvederon (la lasta rezidejo de Marŝalo Piłsudski, Instituton por Blinduloj kaj Surdmutuloj, oni starigis monumenton al Kopernik, ĉizitan de Thorwaldsen kaj ankaŭ estis mendita ĉe li la monumento al Princo Poniatowski. Ankaŭ oni ekkomencis konstrui operejon.

En la j. 1818 estis fondita la Varsova universitato, Politeknika Lernejo, astronomia observejo. Tiam verkis Chopin kaj Krasiński. Varsovio estis vera kultura centro de tiama Polujo.

Sed post la malsukcesinta insurekcio en j. 1830/31 komenciĝis malhela erao de regado de la rusa „Princo Varsovia" Paskiewicz (elp. Paskjeviĉ). Estis konstruita citadelo, kies kanonojn oni direktis kontraŭ la urbon... Ĉiuj civitanaj rajtoj de la loĝantaro estis nuligitaj. Senindulge subpremadis ĉion la regado de la caro Nikolao I. Malmulte ŝanĝiĝis dum la regado ĉe la sekvonta caro Aleksandro I kaj en januaro de jaro 1863 eksplodis nova insurekcio, kies kapo kaj koro estis Varsovio. Ankaŭ ĝi vidis la tragikan finalon, kiam sur la deklivoj de la citadelo oni pendigis 5 membrojn de la Nacia Registaro.

Dum la postinsurekcia reakcio Siberio, konfiskadoj kaj diversaj persekutoj estis ĉiutagaj aperaĵoj, tamen la spirita vivo de la ĉefurbo ardis kaj floris. Ankaŭ la mastrumada vivo estis kontentiga. Aperis novaj urbopartoj, parkoj, malsanulejoj, tramoj.

La rusa revolucio de 1905 multe instigis la nacian vivon. La fama pola verkisto Sienkiewicz (elp. Sjenkjeviĉ) tiam diris... „ekbrilis al ni la unuaj radioj de libereco kaj ni atendas nur aperon de ĝia suno."

...Kaj en la novembraj tagoj de la j. 1918 Varsovio fariĝis la ĉefurbo de la libera, sendependa lando.

Nun Varsovio kreskas kaj plibeliĝas de tago al tago. Multaj modernaj domblokoj, eĉ tutaj novaj urbopartoj estas

konstruitaj. Oni starigis novajn monumentojn. Elkreskas novaj belaj konstruaĵoj, ministerioj, lernejoj, muzeoj, teatroj. La urbo ĉiam moderniĝas. Staranta sur meza vojo inter la oriento kaj okcidento, la urbo havas ĉiujn eblecojn de la bona disvolviĝo. Tamen ankoraŭ nun rimarkiĝas en la urbo influoj de ambaŭ kulturoj kaj de la longa fremda jugo. Tiel ekzemple, en la centro de Varsovio al grandaj modernaj konstruaĵoj modeste sin premas unu-duetaĝaj domoj, sur pavimoj rapide ruliĝas aerodinamaj aŭtomobiloj kaj ĉevaloj vipataj de veturigistoj tiras fiakrojn: — ĝenerale ŝatata amuzaĵo de eksterlandanoj, venantaj en la urbon.

Kaj fine ĉu ni devas ankoraŭ aldoni, ke Varsovio estas urbo kara al ĉiu esperantisto. Ja en tiu ĉi urbo vivis, laboris kaj mortis nia neforgesebla Majstro, ardo de Lia ideo kaptis la unuajn disĉiplojn kaj el Varsovio „per flugiloj de l' facila vento" disiĝis tra la vasta mondo la „nova sento".

I. Dratwer.

PRI ARANĜOJ DE LA KONGRESO

Ofte oni aŭdas, ke la kongreskotizo estas tro alta. Ni provu esplori, ĉu vere estas tiel. Anticipe ni diru, ke ja 20% de la kongreskotizoj enfluas en la kasojn de niaj Centraj Organizaĵoj, helpante, tiamaniere, al la disvolviĝo de la Movado.

Ni do vidu, kion ricevos la Kongresano por 80% de sia mono.

1) Por eniri en la landon oni bezonas ja vizon. Kongresanoj ricevos ĝin, kompreneble, senpage.

2) Sur fervojoj al la kongresurbo kaj reen, ankaŭ por viziti la landon estas rabato (33% resp. 50%).

3) Krom multaj dokumentoj, insigno, kongreslibro. oficiala monatgazeto „LA JUBILEA", kongresanoj ricevos 300-paĝan „Oran Libron" de la Esperanta Movado.

4) Unika aranĝo estos kabaredo kun artista programo, okazonta dum la interkonatiĝa Vespero.

5) solena malfermo de la Kongreso ĉiam postlasas neforgeseblan impreson je ĉiu partoprenanto.

6) Solenaĵo ĉe la tombo de nia neforgesebla Majstro. Ĝin partopreni ja revas ĉiu esperantisto tra la mondo.

7) „Festo de veteranoj", dum kiu ni honorigos tiujn, al kiuj ni ŝuldas la staton de nia Movado.

8) Internacia balo — certe ne bezonas reklamon, tiom pli, ke dum ĝi diversaj surprizoj. (Alportu naciajn kostumojn, sed ne fantaziajn. Ni ne faru maskobalon kaj ne ridindigu nin).

9) Folklora prezentado montros al la kongresanoj diversecon kaj variecon de polaj naciaj tipoj, kostumoj, dancoj.

10) Esperanta prezentado kaj koncerto ankaŭ okazos.

11) Por montri al la vasta publiko nian ekziston okazos demonstracio tra varsoviaj stratoj, kunligita kun enmurigo de memortabulo sur la domon, kie loĝis kaj mortis la Majstro.

12) Ekskurso al Bialistoko — naskiĝurbo de Zamenhof (75% fervoja rabato garantiata. Ni klopodas, ke ĝi estu tute senpaga).

13) En kadroj de la Kongreso okazos ankaŭ TEKA-kongreso, kiu estos potenca demonstracio inter kuracistoj kaj sciencistoj. Ni notu, ke polaj sciencaj aŭtoritatoj multe helpas al sukceso de tiu ĉi Kongreso.

14) Grava estas ankaŭ TAGE-konferenco, kies signalvorto estas „esperanto en la lernejojn".

15) Ĉu ni povas forgesi pri niaj blindaj amikoj, kiuj kunsidos aparte?

16) Ankaŭ multaj aliaj gravaj organizaĵoj kunsidos dum nia Jubilea.

17) Aldone ni diru. ke dum la kongresaj tagoj okazos gvidado tra la urbo, senpaga vizito al ĉiuj muzeoj kaj bildgalerioj kaj ke kongresanoj profitos de rabatitaj biletoj en urbaj tramoj.

Jen estas nur supraĵa kaj neplena skizo de la aranĝoj de la Jubilea Kongreso. Ju pli frue vi aliĝos, des pli bonaj ili estos. Tial ne hezitu kaj aliĝu tuj al la Kongreso, por ke ĝi estu vera impona manifestacio de nia movado.

Memoru, ke Varsovio, la urbo de Zamenhof atendas kaj kore bonvenigos vin.

Estu la Kongreso vera festo de la Tutmonda Esperantistaro.

LASTAJ NOVAĴOJ PRI LA KONGRESO

La nombro de la kongresanoj superis jam 400. Multaj landoj ankoraŭ ne estas reprezentitaj. La Naciaj Asocioj zorgu nepre, ke el iliaj landoj venu almenaŭ unuopaj reprezentantoj,

NI HONORIGU LA MAJSTRON!

„Esperanto en la lernejojn!" jen estas la signaldiro de nia Kongreso. Sed dum nia Jubilea Jaro ni honorigu tiun, al kiu ni ŝuldas Esperanton. Ni honorigu D-ron L. L. Zamenhof — jen estas la dua signalvorto de nia Kongreso. Kaj la Tutmonda Esperantistaro honorigos sian Majstron dum la Universala Jubilea Kongreso en Varsovio sur Lia tombo. Solenaĵo sur la tombo de Kreinto de Esperanto estos neforgesebla travivaĵo por ĉiu esperantisto. Partoprenu tiun ĉi solenaĵon multnombre, kiel decas al la Esperantista popolo!

Ĉiuj lokoj kunligitaj kun vivo de nia Majstro estas nepre memorindaj. Tial dum la Kongreso oni enmurigos la memortabulon en la domon, kie loĝis kaj mortis Zamenhof ĉe Królewska str. 41.

Ankaŭ por honorigi la Majstron kaj montri al la vasta publiko, ke ni ekzistas, okazos demonstracio tra la urbo. Kunportu viajn klubajn kaj naciajn flagojn.

Por inde honorigi la 50-jaron de Esperanto ĉiu kongresano ricevos senpage 240-paĝan „Oran Libron", eldonitan de „Literatura Mondo" laŭ komisio de LKK.

Ĉiu kongresano ricevas senpage la oficialan gazeton de la Kongreso „La Jubilea".

Ne parolu tro multe, sed agu
Kaj por la kongresa karto tuj pagu!

GRANDA INTERNACIA KONKURSO. Ĉiutaga gazeto dum la Kongreso.

LKK helpata de kelkaj samideanoj — profesiaj ĵurnalistoj — eldonos dum la Kongreso ĉiutagan gazeton, kiu servos al kongresanoj por ĝenerala informo.

La enhavo de la gazeto estos: politikaj kaj ĝeneralaj informoj, kongresa kroniko, intervjuoj, felietonoj kaj varsovia kroniko. Ĝi estos grandformata kaj sufiĉe ampleksa.

LKK anoncas grandan internacian konkurson por la titolo de la gazeto. Persono, kies proponita titolo estos akceptita ricevos valoran premion. (Bela libro!). Ĉiuj samideanoj partoprenu la konkurson kaj skribu plej malfrue ĝis la 1-a de julio al LKK de la Universala Jubilea Kongreso, Warszawa I, Chmielna 26/8, Polujo.

KONGRESAJ GLUMARKOJ.

Aperis belaj kongresaj glumarkoj. Ni sendas 50 pecojn por 1 zł. aŭ 2 respondkuponoj. Nepre unu la kongresajn glumarkojn sur ĉiu via korespondaĵo! Postulu de LKK, Warszawa I, Chmielna 26/8, Polujo.

POLICANOJ LERNAS ESPERANTON.

En Varsovio estas nun fama instruisto kaj propagandisto s-no Tiberio Morariu, kiu gvidas kursojn laŭ Ĉe-metodo. Al la speciala kurso por policanoj enskribiĝis 249 pers., inter kiuj 3 policoficiroj.

Estas preparataj kursoj por tramvojistoj kaj instruistoj.

PROPAGANDAJ BROŜUROJ PRI POLUJO.

Aperis jam belaj broŝuroj pri Varsovio, Krakovo, Vilno kaj Gdynia, eldonitaj de Trafikministerio. Post kelkaj tagoj ni komencos ilin dissendadi.

DRO JAN MĘDRKIEWICZ

(Personaj rememoroj).

Subita morto forprenis el la listo de vivantaj agantoj unu el la plej entuziasmaj spiritoj en nia movado.

Dron Jan Mędrkiewicz mi ekkonis antaŭ la milito, kiam mi kun s-ano J. Kriss fondis en Krakova Universitato esp. rondeton, 1911. Antaŭ la kongreso VIII en Krakovo en 1912 li gvidis la kurson por policanoj kaj fotografis sin kun ili („Pola Esperantisto", 1912). Poste dum mardaj vesperoj en „Societo Esperanto" en Krakovo li kelkfoje prelegis pri la anatomia terminaro esperanta.

Dum la milito kaj post ĝi mi perdis lin el la okuloj. Lia agad-kampo estis Lublin, kie li laboris kiel kuracisto. Tie li ankaŭ estis konata kiel esperantisto.

Lia aktiveco skriba en „Pola Esperantisto" videbliĝas en komenco de 1925 (nro 1/2, paĝo 18) kiam li priparolas la agadon de Sovetujo kontraŭ XVII univ. esp. kongreso: sur paĝo 126 ni legas pri la priesperantaj prelegoj en Lublin 17 X 1926. La 40-jara datreveno de publikigo de esp. instigas lin skribi marte 1927, nro 3, la tre prudentan artikolon: „Czterdzieści lat próby", (40 jaroj de provo) en majo 1927, nr. 5: „Kiedy esperanto zwycięży?" (Kiam esperanto venkos?) — Li antaŭvidas, ke tiu ĉi periodo venos, kiam la direktantaj sferoj konvinkiĝos, ke la vekiĝinta spirito de la nacioj de Azio formos la baron kontraŭ la plua penetrado de la angla aŭ franca lingvoj. En oktobro 1927 (nro 10) li skribas artikolon pole „Ĉu Esp. estas la artefarita lingvo?" Li venas al la konkludo, ke krom la fundamenta granda laboro de dro L. Zamenhof, en Esperanto kaŝiĝas la penadoj de multaj aliaj kunlaborantoj. En decembro 1927 (nro 12) li verkas esp. (paĝo 180) la artikolon kontraŭ plibonigaj ideoj de Teo Jung en „Heroldo de Esperanto". Tiu ĉi jaro 1927 estis la plej aktiva jaro en lia publicista agado. En 1928 li verkas artikolon pole: „Ĉu Esp. estas la viva lingvo? (novembro 1928 nro 11 kaj decembro, nro 12). En tiu ĉi artikolo li atentigas, ke oni intermiksas la vivajn naciojn kun iliaj lingvoj, kiuj, estante la sistemoj de akustika signalizo, ĝenerale ne estas io vivanta. En 1936, paĝo 110, li publikigas „la proteston" kontraŭ agado de Bastien en Wien, sur la paĝo 130 — la artikolon pri la „Sipromptiĝo", pri IEL kaj kuranta stato de Esp. organizaĵo. En 1937 li finas sian publicistan agadon per la „Averto", ke la demando de IEL kaj UEA ne influu la varŝavan jubilean kongreson en 1927, kiun li jam ne ĝisvivis.

En ĝeneva „Esperantisto" li atentigis pri la angla eldono de la unua lernolibro de Zamenhof.

La impreso de tiuj ĉi artikoloj estas, ke skribis ilin la aganto, kiu profunde trapensis esperantismon. Li skribis plej grandparte pole pro la propagandaj motivoj, kvankam Esperanton li posedis bonege kaj elokvente.

Sed la plej grava signifo de lia agado tute ne ripozas en la ĉi supre cititaj artikoloj, enhavantaj cetere la ideojn bone konatajn al ĉiu Esp.-aganto, sed en la granda entuziasmo, kiun li jetis por la agado pri la samtempa enkonduko de Esp. en la lernejojn. Li estis unu el la unuaj personoj, kiuj ĝin ekkomprenis en ĝia tuta graveco kaj komencis por ĝi labori kun retirita spiro. Li estis eĉ preta veturi al Ĝenevo kaj labori por ia parto de la vivsubteno, kiun li gajnadis kiel kuracisto en Polujo por realigi la ideon, al kiu li aliĝis tutkore. Oni pri tio ĉi en Ĝenevo ne konsentis, eble pro ŝparaj kaŭzoj. Tiam li komencis agadi propramane. Li fondis ĉe la societo esp. en Łódź la „Scienc-politikan Sekcion" 1930, kies ideo estis propagandi la ideon pri samtempeco de la enkonduko de Esp. en la lernejojn inter fremdaj konsulejoj en Polujo kaj inter polaj konsulejoj eksterlande. Ambasadoro Chłapowski atentigis lin, ke la konsulejoj agas tamen laŭ la direktivoj ricevitaj de la ministroj por ekstero. Konsuloj povas sekve fari nur tion, kion al ili ordonas ministro por ekstero. Tiel la agado reduktiĝis al tio, kion faradis de 1922 ĝeneva centralo, aŭ U.E.A., aŭ I. C. K. kiel organizaĵoj reprezentantaj la tutan esperantistaron, ne iun „sekcion" de unu societo.

Sed la entuziasmo de dro J. Mędrkiewicz estis tiel granda, ke li kvazaŭ ne vidis, kion oni faris antaŭ li kaj ke iniciatinto de tiu ĉi ideo pri Interŝtata Esp. Akordo (termino uzita unue de U. E. A.) estis Pola Esp. Societo en Varŝavo en 1920. La disputoj kaj rezolucioj de Krakova Kongreso en 1931 elkreskadis en liaj okuloj al io komencanta kvazaŭ la novan epokon. Krom la entuziasmo instigadis lin propraj ambicioj, kiuj ordonis al li ŝanĝi eĉ la ĝisnunan terminon „Interŝtata Esp. Akordo", posedanta jam sian historion kaj grandan arkivon de dokumentoj, je „Internacia Lingva Traktato". Koncerne tion ni iom disiradis en la opinioj. Mi, havanta plenan respekton por lia entuziasmo kaj neniam kaj neniel volante bari la vojon al la laborantoj por tiu ĉi grava ideo, postulis tamen, ke estu konservata la termino „Interŝtata Esp. Akordo". Li obstine uzadis la sian. Iuj samideanoj, atestantoj de tiu ĉi silenta kverelo ne komprenis ĝin. Ili opiniis, ke temas nur pri la nomoj. Sed dro Jan Mędrkiewicz ne konis sufiĉe la presitajn materialojn el antaŭ 8 jaroj. Li ne posedis emon arĥivist-historian, kiel li mem tion ĉi unufoje al mi konfesis. Oni ne povis forviŝi la estintecon. Fin-

fine la kverelo estis „solvita" tiel, ke oficiala nomo estu „Interŝtata Esp. Akordo", kio ne malhelpas uzi ne-oficiale aliajn nomojn. La „solvo" malpraktika: kvazaŭ iu volus uzi krom metra sistemo la aliajn.

Interne, se temas pri la ideo mem, estis inter ni neniaj malkonkordoj. Sed, forlasinte la ambiciojn de la mortinto kaj pritraktante lian laboron laŭ ĝia enhavo, oni devas homagii lian efektive romantikan, pursentan entuziasmon, kun kia li plenkore aliĝis al tiu ĉi ideo, kiun li volis disvolvi postulante de la registaroj, ke ili alsendu al la universalaj kongresoj specialajn ŝtatajn observantojn de nia movado, specialajn oficistojn, kiuj raportus ĉe ministerioj pri esp. movado.

Unu ideon li ne komprenis, kvankam lastamonate ĝi eble komencadis ĝermi en li. Mi jam en 1931/2 ekkomprenis, ke oni devas subteni la ideon pri Akordo per iu listo de ĝiaj subtenantoj, de bone konataj nomoj de ne-esperantistoj. Tiel naskiĝis ideo pri „plebiscito", diskutita precipe dum la kongreso en Lublin en 1932, kvankam unu jaron pli frue ĝi estis jam akceptita dum universala kongreso en Parizo. Li opiniis ĝin superflua kaj efektive mirinde estis, kiel dum la kongreso en Lublin, al kiu li prezidis, li kontraŭ la konkordo de la kongresanoj ne volis ĝin doni al la voĉdonado, trovante diversajn malfacilajojn. Tiam en lia koro luktis lia propra konvinko kun la devo de kongresprezidanto. La ideo estis tamen akceptita, sed ne realigita. Eĉ mencion pri ĝi oni ne lasis en raporto kongresa en „Pola Esperantisto".

Li apartenos ĉiam al panteono de la spiritoj, kies kapon priradios la verdluma nimbo de idea entuziasmo.

Estimon por lia memoro!

Dr. Antoni Czubryński.

JAN KOCHANOWSKI.

Satiruso aŭ viro sovaĝa.

Jan Kochanowski (nask. en 1530, mort. 1584 en Lublin) studis en Padovo kaj en Parizo. Tre frue li skribis poeziajojn unue laŭ latinaj modeloj (elegiojn kaj himnojn), poste li turnis sin decide al pola Muzo kaj ricevis tuj la palmon de plej eminenta poeto de sia epoko.

Liaj plej valoraj verkoj estas: La Muzo, La Konkordo, Satiruso, La standardo, La trenodioj, La reekspedo de greka delegitaro (dramo laŭ greka maniero), La psalmaro de David.

* * *

Spite mia aspekto, malgraŭ kapkornparo,
Vizaĝo ne tra ĉarma, piedvilhararo,
Mi estis tamen dio en antikvaj jaroj
Kaj hejmo mia estis densaj en arbaroj.

Sed vi, Poloj, tro ilin ĉie ekstermigis,
Ke fine Satiruson vi eĉ ekshejmigis.
Ĉiuflanke hakado: jen fag' por fornego,
Aŭ pino por la peĉo, aŭ kverk' por ŝipego.

Kaj mi devos finfine pro homa avido
Forlasi mian groton — maldolĉa decido!—
Kaj serĉi aliloke por posta sezono
Novan hejmon ĉe homoj, por kiuj la mono

Ne estus solsoifo; pro la elhakado
Mankos baldaŭ ja ligno por fornohejtado.
Ne estas refuteble; laŭ la fakolisto,
Kiu ĉe vi plej nombra? Vendist' aŭ plugisto!

Plej grava: Silezion vendtiri bovaron,
Aŭ Danzigon sur flosoj fluigi grenaron.
Podoli' evitata, ĉar inter Tataroj
Pli signifa la sabro, ol komerctalaroj.

Ve! la moroj ŝanĝiĝas! Laŭ mia memoro
Ĉe Poloj neŝatata estis montrezoro,
Plugan kampon ja tiam kamparano flegis,
Nobelar' kavaliran arton nur ŝategis.

Ĉu tro pezis sep jarojn rajdi ne ĉesante
Dum frost', malbonvetero, aŭ eĉ malsatante?
Sola estis riĉaĵo elsabrigi gloron
Kaj per ĝi pli ornami, ol per or' honoron!

Kaj se fine la penso kliniĝis al paco,
Oni ne tuj demetis glavon malgraŭ laco,
Sed kvazaŭ jam atendus nova militiro,
Armilon prete tenis ĉiam nobelviro.

Krom tio svarmis ĉiam sur la kamp' taĉmen-
Salajrataj senŝpare per dukatocentoj: [toj
Elspezo fruktodona, ĉar en tiu skolo
Formiĝadis estonta de junviroj rolo.

Tiel Poluj' grandiĝis, tiel landlimaroj
Etendiĝis ĝis inter du kontraŭaj maroj.
Tial leĝoj la polaj, tial respubliko
Ofte estas citataj en fremda kroniko.

Ĉu vi tion ne scias, ke sama metodo
Estas por ŝtat-akiro kaj -gardo la kodo?
Kiom viajn vi glorajn patrojn malegalas,
Kaj pro tio Polujo en malgloron falas!

Plugoj nun elforĝataj 'el patraj armiloj,
Ponardoj dume servas kiel fumrostiloj.
En la kaskoj kokinoj la ovojn elkovas,
Aŭ avenon stalisto al ĉeval' subŝovas!

Kaleŝa — jen valora ĉeval', kaj en stalo
Plej inda sekvantaro: bovo aŭ bubalo.
Rotmajstr' nun oni iĝas plugistojn nuante,
En man' anstataŭ glavon — la vipon estrante!

Sed ĉu tio kredinda, juĝu mem ateste.
Aŭdiĝas tamen voĉo inter vi proteste,
Ke per terkulturado la lando riĉiĝis,
Se eĉ ne tro da oro en ĝi amasiĝis.

Certe, ke viaj patroj oron ne avidis,
Ili preskaŭ al plena monsako ne fidis,
Sed per sia braveco ili ŝtatojn prenis,
Aŭ eksterlandajn princojn kiel sklavojn trenis!

Ĉu vi trovas fabela, ke urbo Kijova
Sep mejlojn ronden havas laŭ mezuro nova?
Aŭ ke sur la preĝejoj estis ortegmentoj
Aŭ brilis alabastre da palacoj centoj?

Ne juĝu tiun urbon laŭ aspekto nuna,
Ĉar restis de brileco nur ombro aŭtuna.
Ĵus tion de la patroj igis brava forto,
Ke fama iam urbo kliniĝas al morto.

Pri Prusuj' ja bezone ne estas rezoni,
Ĉar Gdańskon flosnaĝante ĉiujare oni
Vidas dense la urbojn, kastelkonstruaĵojn,
Ŝoseojn, decajn pontojn kaj bordofirmaĵojn,

Kio ja nefarebla sen mono grandkvanta:
Estis tie videble saĝa majstr' estranta.
Kio sekvis? La Poloj prusan teron prenis,
Riĉul' al senmonulo servi sin ne ĝenis.

Vi, monhavaj, nun montru vian la sukceson!
Mi aludos antikvan ne tro intereson:
Lastatempe Tataroj kvinfoje invadis
Kaj viaj fratgentulojn al Turkoj vendadis.

La despoto enfine — por diri la veron —
Je via malhonoro tretis vian teron.
Rusoj, prenis Połockon kaj ĵure pretendas,
Ke Haliĉ' laŭherede de ili dependas.

Konsiderante rajton mi firme atestas,
Ke ili al traktatoj malfidelaj restas.
Eĉ pli: Svedoj transmare ataki vin penas,
Inflantujon el via man' ŝire elprenas,

Brandenburgon haltigas fine nur Vistulo
Kaj pro li ĵus suferas pola marbordulo.
Jen la viaj riĉaĵoj! jen via premio,
Ke krom plugo jam restis al vi jam nenio.

Jen ne pli, ol komenco, certe post momento
Ŝutiĝos malfeliĉoj, kiel monttorento,
Kiam masko foriĝos kaj komprenos mondo,
Ke jam de batalistoj malpliiĝas rondo.

Ne konfidu al Turko, se eĉ ne urĝanta:
Li certe scias, kial li estas cedanta.
La maro, kiam ĝi ja tro trankvila kuŝas,
Ofte baldaŭ la bordon difektige puŝas.

Kun Germanoj rilaton mi ne ekzamenas,
Aŭ ĉu lian vi forton sufiĉe komprenas.
Certe estas, ke vian landon li insidas,
Ĉiam pecon pli grandan forŝiri avidas.

Fortrunkigu vi arbojn, pretigu fiŝlagojn,
Sur Vistul' veturigu kverkojn, aŭ la fagojn,
En arboj iĝu cindro, el arboj trabaro:
— En la nomo de „Poloj" sonas ja „kamparo" —,

Nu, vi kien rifuĝos dum militinvado?
Peza estos laŭvide al vi batalado
Sen ĉevalo, armiloj, sen urĝa ekzerco,
Sen kiuj batalado iĝas nura ŝerco.

Ha, rigardu, vi kion per riĉeco gajnas,
Ke arton kavaliran vi jam perdi ŝajnas,
Dank' al kiu ne sole posedaĵo tera.
Sed ankaŭ la loĝanto fariĝas libera.

Nu, aliaj laŭvole estu jurkonantoj
Kaj pri ĉiu afero saĝe parolantoj!
Fiafero ja estos al saĝo pretendi,
Se mankos la armeo por limojn defendi.

Se per oro minace najbarojn vi tentos,
Des pli frue ilian invadon vi sentos.
Sed riĉaĵojn verdire ĉe vi mi ne vidas,
Ke vi mem vin admonu, mi tro ne konfidas.

Multaj el vi bienon eĉ sian ne gardas
Kaj patran bufedaron ĉe judo lombardas.
Ho ve! venas mizero, se mank' hejme nestas;
Eĉ pli granda, se sekve ekshejmiĝi restas.

Kio, pro Di', la kaŭzo, ke tiaj estante
Mastrumistoj, vi tamen veas malsatante?
Lukso tro petolanta, luks', kies viktimo
Ĉio iĝas, se saĝa forestas reĝimo!

Oni ne kontentiĝas diboĉi garbaron,
Sed forspezas ĉe tablo hejmon kaj grunda-
Fine gastojn regalas se moŝta sinjoro, [ron.
Li ne cedos obstine en sia honoro:

Viajn kvindek manĝaĵojn li eĉ triobligos;
Donu brandon: li krome servistojn trinkigos.
Vi linkon, li zibelon, vi oron ĉe ĉapo,
Li portos oran bukon krome sur ŝukapo.

Ĉe li larĝaj galonoj laŭ moda ordono,
Kaftano multekosta por ĉiu sezono.
Husaran uniformon, kiam li surprenos,
Tuj je pelta kolumo vi lin ekdivenos.

Se mankos alparole: „Moŝta vi, Sinjoro",
Krudkonduton riproĉos al vi lia koro.
Ludperdaĵo — eĉ granda — lin tute ne ĝenas,
Reston eĉ al servisto disdone li tenas.

Flatantoj — lia korto, por konsil' — trompistoj,
Pordisto ne bezoŝa: ĉe pord' kreditistoj.
Por li vi ŝparas, ĵus li faras vin ŝuldantoj,
Li vin ĵus ekshejmigas kaj igas servantoj.

Pli valora de patroj estis, pli valora
Mizero, ol hodiaŭ lukso senhonora!
Kiu fondas kastelon, aŭ monaĥpreĝejon,
Farmigas la urbeton aŭ sinjoran ejon?

De viaj patroj mano estis malavara
Kaj ŝtatafer' al ili pli, ol hejma, kara.
Preni oni preferas nune, ĉar sen kosto,
Ol doni al la reĝo, aŭ al la preposto.

Havu plenajn jam via pokalojn najbaro,
Li diros, ke eĉ lanon ne donas ŝafaro.
Jen — vi diros — papisto laŭ tia parolo.
Kial ne pro la kornoj, aŭ tro longa kolo?

Pri religiaferoj evitu disputi,
Ĉar mi ne instruita povas nur balbuti.
Sed se vi pli kapablas laŭ via bonsento,
Eliru por defendi tezojn en Tridento.

Kristana estas vere ne la disputanto,
Aŭ pri vivo morala sprita parolanto,
Sed kiu alĝustigas farojn al la volo
De sia Di' Sinjoro — jen kristana rolo.

Nu, ja kio famigis glave polan kronon,
Ĝis kiam ĝi obeis la Dian ordonon?
Ĉu estis dum batalo fiparolo ebla?
Silogismo tre stranga, eĉ nediskutebla.

La Polo en si pensis: Manka mia menso,
Tro mistera de diaj sekretoj la senso.
Al Sinjor' sed mi kion ĉe bapto promesis,
Tion serve oferi al Li mi ne ĉesis,

Jen mia fundamento nune kaj estonte,
Mi ĝin jam ne perfidos, eĉ kapon perdonte.
Riproĉu lian kredon, li tuj parolaĉas,
Ke kun alikredanoj vivi al li plaĉas.

Mi nek studis en Lipsko, nek en Praha kre-
Nek direktis Ĝenevon iam la piedon, [don,
Mi lernis ĉe l' ermitoj inter ni loĝantaj
En dezertaj kabanoj en montoj kuŝantaj.

Ili montris eternan al mi Disinjoron
Kaj plenigis per amo je Li mian koron.
Sed antaŭ konvertiĝo hezito min prenis,
Ĉar antikva kutimo ankoraŭ min tenis.

Bakĥo min ĉiam tentis, al konsilo tiris,
Ĉiam min al regaloj allogi deziris.
Ariadnon rabante, kiam li rifuĝis,
Antaŭ lia vizaĝo mi moke ekmuĝis.

Sed la tempoj ŝanĝiĝis iĝis for diaro
Kaj kaŝiĝis plej multe densa en arbaro.
Baptiĝinte mi iris malgraŭ kordoloro
Al la homoj kun sankta kaj honesta moro,

Sen tia avideco, kiu potenculojn
Simile nun korodas, kiel malgrandulojn.
Ĉiam multe pli gajni — hodiaŭ honoro,
Dum antaŭe nur oni aspiris al gloro,

Kaj serĉis ĝin ne trinke, ne per la festenoj,
Sed per valoraj faroj, aŭ per indaj penoj.
Pro mank' de avideco nenia juristo
Fama iĝis antaŭe, nek altoficisto,

Ĉar ne statutoj estris, sed virto sincera,
Do vivis civitanoj en konkordo vera.
Nune iĝas la mono ĉiam pli bongusta,
En angulon rifuĝas dume virto justa.

Ĝian lokon senhonta prenis kalumnio:
Tuj necesis statutoj kaj konstitucio.
Ĉu ja preteririndaj viroj noblaj, rektaj,
Kiuj rifuzis sidi ĉe tabl' kun suspektaj?

Antaŭ tiaj surtablan oni tukon ŝiris,
Ĝis fine malnoblulo hontiĝe foriris.
Dume nun perfidulo, aŭ eĉ mortiganto
Gracon trovas publike ĉe la protektanto.

Pli solidaj laŭ tiu rilato virinoj,
Ĉar ili testamente havas post patrinoj
Ne proksimiĝi al la laŭĉaste neindaj,
Pro kio ili vere fariĝas glorindaj.

Kia estas nun via post patroj heredo?
Ĉu estas nun la sama en la koroj kredo?
Ĉiam servi la veron ili kore ĝuis
Kaj filojn ili veron paroli instruis.

Ne nur diri, obei ankaŭ — granda celo,
Ĉar vero ja devenas mem el la ĉielo.
Stranga via konduto, ĉar antaŭajn morojn
Vi forjetis kaj tute ŝanĝis viajn korojn,

Sed postulas antikvan juĝkonstitucion,
Por ke reĝo respektu vian anarĥion.
Pasinttempe ĉi ŝarĝo estis tolerata,
Dum konkordo kaj paco estis respektata.

Domaĝon tuj najbaroj kompensi rapidis,
Ke estraro neniam pri ĝi eĉ decidis.
Depost kiam obliĝis novaj aferistoj,
Ĉiam kalumniantoj kaj la procesistoj,

Fiajn ili aferojn tuj ĵetis en Sejmon,
Por ke sin defendonto forlasu la hejmon.
Kiu havas ferkapon, aŭ la paciencon
Por ĉiun aŭskultadi kaj trovi esencon?

Al antikvaj la moroj aŭ vi tuj revenu
Kaj nunan leĝsistemon obee retenu,
Aŭ se ĉiuj preferas la novtempan modon,
Alĝustigu al tempo statuton kaj kodon!

Tro eĉ por Satiruso leĝaron komponi!
Ĉiu povos post mia parol' voĉon doni.
Mi diras laŭ kompreno: se estas pli prava
Alia help', ĝin diru, se mia mankhava.

Sed antaŭe aŭskultu mian ĝis la fino:
Ne tro longa jam estos pri konsil' kombino.
Ho, mi scias: vi kiam paroli komencos,
Ne frue retoradon vi ĉesi intencos.

Kio sekvas? Laboron de monatkvarono
La Sejmo nun distrenas ĝis jaroduono.
Pro tio vi Połockon el mano ellasis,
Ĉar t'empo por batali dum sejmado pasis.

Sed mi kion riproĉas, evitadi penas,
Poste eĉ kontraŭulan manon kore premas.
Nu, kial Italujon, aŭ al la Germanoj
Elsendataj por lerni nun familianoj?

Vi havas ja lernejojn, kien eĉ fremduloj
Antaŭe alveturis estontaj kleruloj.
Estos al vi bezonaj novaj instruistoj,
Baldaŭ iĝos el ili Gregorianistoj.

Se mankos al popolo kaj ĉi oportuno,
La plendado ne ĉesos pri imposta puno.
Kompreno pri honoro estas multvalora:
Baldaŭ vi egaliĝos kun Sorbono glora.

Kioma sendelspezo por studontaj filoj!
Baldaŭ eĉ el Padova venos al vi miloj.
— Sed vi pro maniero sendas eleganta —:
Ho! ke fremda ne iĝu lernad' skandalanta!

Ĉu bono, ĉu malbono pli gustas al juna,
Vi konjektu laŭ via bonkompreno nuna.
Mi simplulo supozas kaj firme atestas,
Ke Poluj' ĵus pro tio traŝanĝita estas,

Ke junul' eksterlande sorbis kapinstruon.
(Pri tio tro paroli farus nur enuon).
Ĉiu ŝtato per sia arto ja validas,
Al kiu junularon viroj firme gvidas.

Ĉar se la modernajojn ĝi jam frue ĝuos,
Laŭ ili ĝi tro urĝe hejmon trakonstruos.
„Ne arbara instruo". — Ĵus je elarbara,
Nur ne ĉion memoras mi, kion la kara

Instruis al mi Ĥiron, stranga mikspersono,
Ĉe li lernis Aĥilles dum kelka sezono.
Li loĝis en la groto laŭ centaŭra moro,
Sed saĝon li eĉ havis de klera doktoro.

Se preta estas via aŭskulti nur volo,
Mi ion memorigos el lia parolo.
„Filo mia! — li diris — en ĉi mia halo
For estos de orelo kaj okul' skandalo;

Sed venos tempo, eble en proksima jaro,
Ke vin mi adiaŭos kaj mia arbaro,
Ke kiel nobla aglo flugilojn vi svingos,
Jam patra zorgokulo vin plu ne atingos.

Tiam gardi necesos vin kaj eĉ atenti
Pri maldeca farajo, por poste ne penti.
Ĉar kiel afidaro iam vin survenos
La monda voluptemo kaj vin for detenos

Kaj vian noblan koron de honesta moro,
Aŭ insidos perdige je via honoro.
Tial bone memoru ĉi mian instruon,
Por en malbonokazo eviti la skuon.

Unue ne forgesu, ke Di' ĉion vidas,
Pekon Li abomenas, sed virton avidas.
Tial antaŭ la faro pripensinde estas,
Ke Dio la farajon ĉeeste atestas:

Ĉu ĝin trovos Li justa, ĉu eble malinda,
Vi estos do benata, aŭ ĵus kondamninda.
Ne estis ja hazardo — vi tion komprenas, —
Ke bestoj sian kapon al ter' kline tenas,

De homo nur vizaĝo fiere levita
Rigardas al ĉielo supren stelorita.
Estis de Di' intenco montri sian volon,
Ke best' kaj homo havas tutdiversan rolon.

Besto ne pli bezonas, ol trovi manĝajon
Kaj kontentigi simple de korp' bezonajon.
Dume homo animon havas el ĉielo,
Do estas lia grava kaj obstina celo

Serĉi tien la vojon laŭ rekta orbito,
Kie regas Plej Alta, Eterna Spirito.
Tial ne malleviĝu la celon sciante,
Evitu diboĉulojn, kiuj malŝatante

Sian altan destinon bestvivi elektas
Kaj vojon al ĉielo malsaĝe neglektas.
Virton nur akompanu, se ĝi eĉ laboron
Sinoferon pretendas, sed poste splendoron.

Estimon ĉe la homoj revanĉe alportos
Kaj lokon en ĉielo, se vi fine mortos.
Ĉar vin krome la domo naskis de famuloj
Kaj vi iam ja estos reĝo de subuloj,

Komencu la regadon de propra persono
Kaj pasiojn subigu al saĝa ordono.
Kontraŭaj nestas fortoj en homa figuro,
Tre diversaj laŭ sia esenca naturo:

Jen estas iritiĝo, ne sata pasio,
Tim' sveniga, bedaŭro, ĝojo kaj envio.
Komandon super ili havos nia saĝo
Por gardi, ke ne iĝu al ni la domaĝo.

Lasu al ĝi reĝimon, subiĝu volonte,
Ke ĝi sciu pri viaj aferoj estonte.
Ĉar se venos ordonoj al subregistraro,
Nepre neevitebla estos la eraro.

Pri sano de la reĝo estas firma gardo
Nek forto de arkajoj, nek batalponardo,
Sed amo de regatoj, la fido kaj paco,
Kio ne eligebla per tim' kaj minaco.

Pli helpos bonkoreco, revanĉa favoro,
Humanema konduto, kompatema koro.
Varbu al vi amikojn: ilian admonon
Ĉiam danke estimu, ĉar tre multan donon

Ricevas reĝ' el oro, arĝento kaj fero,
Plej malmulte li havas tamen nur da vero.
Ne allasu do via orel' aŭskultema
Flatadon, ĉar ĝi estas spegulo trompema,

Deformanta de viaj faroj manieron,
Vualanta kompleze antaŭ vi danĝeron.
Per virto organismoj firme staras ŝtataj,
Se bonaj estas supre, malnoblaj — punataj.

Plej tamen dezirinde: Estu mem modelo;
Subulo sekvos estron en virto kaj belo.
Sed ĉion ja surgardi malfacile estas,
Tre multe da laboro por aliaj restas:

Do ĉiun ekzamenu laŭ lia taŭgeco,
Ĉar kvankam inda estus ies nobeleco,
Se pri mar' kaj ĉielo li ne estas sperta,
Ŝipon li pereigos, dronos mem mallerta.

Simila estas perdo, kiam sur posteno
Estras monavidulo; ĉar venas malbeno
Se li estas korupta kaj justecon vendas,
Dum perdon suferintoj plendojn al Di' sendas.

Pacon ĉiam preferu. sed al militado
Batalpreta vin igu saĝa ekzercado.
Laŭ mia pri ĉielo iom sperta kono
Baldaŭ aŭdos la Greko pri urĝa bezono.

Jam vidas mi rabiston kaj perfidan gaston
Pretigantan ĉe maro el arbtrunkoj maston
Por tutnovaj galeroj, riparantan ŝipon,
Ordigantan remilojn, velojn kaj ekipon.

Gajnon ĉe vi esperas laŭ kalkulkombino
Fripona invadonto ebria pro vino.
Intencatan atakon li ekpreni penos,
Kvankam invadefekton li ja ne divenos,

Ĉar apenaŭ li sian bandon diskuŝigos,
Kontraŭ lin la loĝantoj armeon pretigos.
Nenion helpos tiam dolĉesona kordo,
Nek alloga vizaĝo, nek rotoj el nordo.

Li forkuros simile post batal' ferura,
Kiel antaŭ la lupo cervo ventekura.
Jen por vi turnirejo! tien vi rapidu
Kaj heredan la famon kun patroj dividu!

Frue lernu rezigni vivokomfortajon,
Por povi entrepreni pli gravan farajon.
Arkon sciu pafĝuste streĉi, sagon sendi,
Kontraŭulon ataki — kaj vin mem defendi,

La riveron tranaĝi, aŭ foson trasalti,
Ĉevalon turni, svingi, galopi, aŭ halti.
Varmon lernu toleri, varian klimaton,
Ĝis fine vi atingos hardan korpostaton.

Lernu viajn kapablojn en unu kunfandi,
Por poste plensukcese armeon komandi.
Vi elserĉu la ejon por firma tendaro
Kaj singarde vin ŝovu kontraŭ norda maro.

Grava scio: taktiko kaj taĉmenta ordo,
Ke ĉio nepre sekvu plena en akordo.
Kaj se la malamiko pli fidas kastelon,
Do pretigu gabion, reduton, subkelon,

Remparon, foson, penu fari breĉan skuon,
Aŭ subfosi subtere al kastelo truon.
Ne ĉio komprenebla el simpla parolo,
Do danĝeron eniĝu mem eĉ via kolo.

Se vi jam maturiĝos, se pliigos forton,
Tentu tuj sur la kampo kirase la sorton
Kaj laŭ ava ekzemplo glave serĉu gloron,
Al fama nom' aldonu novan ĵus spendoron.

Estas ja preferinda distingiĝo brila
Per braveco, per virtoj kaj faro armila,
Ol simpla kadukiĝo dum vivo velkanta
Sen famo, sen brilfaroj, sen gloro ĉarmanta.

La sorton Dio estras, vana estos fido
Je armil', se forestos de Di' bena gvido.
Virto per glor' revanĉas: do troviĝos viro
Elokventa kaj plena de Dia inspiro,

Kiu viajn belfarojn, indajojn ensume
Prezentos al la mondo belforme, orplume,
Ke nomo via brilos sur la firmamento
De mondohistorio ĝis fina jarcento." —

Tiajn donis al virto instigojn Centaŭro
Montrante al junulo vojon al glorlaŭro.
Mi tion kaŝaŭskulte sorbis per orelo
Sen pens', ĉu tio servos al ia ajn celo.

Sed — kia ĉe mi saĝo? Vi min forpeladas,
Per pioĉoj — mi dume pri virto traktadas.
Estus eble pli ĝuste pri la memreĝimo
Vipan fari predikon, ke tremu animo.

Tio neevitebla laŭ mia espero,
Se mi devos elmigri el ĉi-tiu tero.
Nune iĝu laŭvole, sed malbon' laŭ ŝajno
Ne forestos: prokrasto estos nur la gajno.

Tradukis Józef Orzech.

Ni adiaŭis nin per kiso.

Ni adiaŭis nin per kiso, —
disigis nin la kruda sort'...
Ankoraŭ mi vin vidas: staris
plorante vi ĉe via pord'.

Ĉu iam mi vin rerenkontos?
Nun inter ni kuŝas landlim'.
Sed — ĉu vi scias? — ĉe vi restis
ne mia korpo, sed anim'.

Jan van Schoor.

POLLANDA KRONIKO

BIAŁA PODLASKA. — Dekkelkajn simpatiantojn de Esperanto arigis ĉirkaŭ si s-ro Stalewski, brava esp-isto veninta el Bydgoszcz kaj nun laboranta en Urząd Skarbowy. — Kunvenoj okazas private.

DROHOBYCZ. — Ekkursis Fanjo Steiger, la Lwów'a instruistino.

KAMIONKA STRUMIŁOWA. — La Lwów'a E-instruistino, Fanjo Steiger, finis tie ĉi kurson kun 32 personoj.

LUBLIN. — Merkredaj kunvenoj en P. E. A. (Królewska nro 6) okazas regule. Dum tiuj ĉi kunvenoj priparolataj estas ĉiam aktualaj esperantaj aferoj kaj estas farata esp. konversacio — gvidata en du grupoj de 2 spertaj estraranoj.

Dank' al iniciato kaj klopodoj de s-roj Matwiejew kaj Wójcik estas organizita en Popolunversitato (T. U. R.) elementa kurso de Esperanto, gvidata parte de s-ro Matwiejew, parte de f-ino H. Olszówko.

Brava, neniam laciĝanta esperantisto s-ro A. Sanek, inspirata de f-ino Ermanówna fondis ĉe juda organizaĵo „Kulturliga" (str. Rybna Nr. 1). „Esperantan Sekcion". — Kurson por 16 personoj sukcese gvidas s-ro Sanek.

Loka Del. de U. E. A. fiksis al muro de domo, en kiu li loĝas (Przechodnia nro 2) ŝildon kun teksto: „Regiona Delegito de Universala Esperanto-Asocio".

Lastatempe faris viziton al Lublina esperantistaro: S-ro Fr. Bortner el Varsovio, S-ro F. Kotliński el Piaski Luterskie, s-ro Mgr. St. Łotocki gimnazia profesoro el Łuków, s-ro J. Dębski el Świdnik kaj s-ro T. Pleskaczyński el Siedlce.

En la esp. murgabloto ĉe la ĉefstrato Krakowskie Przedmieście 66 nun estas videbla bela reklamafiŝo de XXIX. Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio. La sama afiŝo estas videbligita en vojaĝoficejo „Orbis" kaj en stacidomo.

S-ro Abramek Aleksander organizis kurson de E. en „Związek Pracowników Lotniczych" kaj f-ino H. Sierakowska en gimnazio de s-ino Arciszowa por skoltinoj. Pri rezulto de iliaj penoj ni skribos en sekvonta komuniko.

LWÓW. — La 16. III. Ĝenerala Kunsido: Oni elektis: Dr. Fels — honora prezidanto; Józef Toczyski — Prezidanto; Dr. Karol Klein, Dr. Leon Brandler — Vicprezidantoj; Frl. Laura Nadel, Frl. Iza Reich — Kasistinoj; Mgr. Wanda Tencer — Bibliotekistino; Minuŝka Mantel — Sekretariino. Renkonte al la Jubilea Kongreso oni distribuis la taskojn farotajn.

Sro Szymon Szpund, konata redaktoro kaj recenzisto de la multlegata „Chwila" (ĉefred. J. Hescheles) fervore nun studas Esp. Ni akiris en la ŝatata persono de Red. Szpund valoran kunhelpon kaj li efektivigos sian promesson, diskonigi nian Esperanton per lertaj propagandaj artikolo en „Chwila". Multan dankon al la fervora nia s-ano Redaktoro Szpund!

—— La 10. IV. okazis solenaĵo, honore al nia Prezidanto Dr. Fels kaj ties vivkunulino, Regina. Korajn vortojn paroldirektis la nova prezidanto Toczyski, kaj sekretariino Minuŝka Mantel, enmanigante la libron „Gösta Berling". Ĉe riĉe dotitaj tabloj oni regalis pli ol 40 ge-anojn, inter kiuj, kiel bonvenaj gastoj, Kap. Jan Silhan, Prez. de UABO, S-ino L. Herman kaj la eminenta redaktoro kaj recenzisto de „Chwila", S-ro Szymon Szpund, nia nova s-ano.

La sekretariino laŭtlegis la gratultelegramojn kaj leterojn. Koran dankon al Dr. Blassberg, Dr. Róbin, Dr. Briquet, S-ro Sapiro, Tiberio Morarin, S-ro Kons. R. M. Frey kaj Danubio-klubo el Wien, Nederlanda grupo kaj aliaj.

Gazeta „Chwila" detale raportis pri la Fels-solenaĵo — dank' al la ĉeestinta redaktoro S-ro Szymon Szpund.

Renkonte al la jubilea Kongreso aperas, dank' al la valora akiraĵo, ŝatata redaktoro Szpund de la multlegata „Chwila", regule okulfrape lokitaj artikoloj priesperantaj.

La 2. IV. raportas „Chwila" pri la alveno de Malmgreen en Varsovio kaj Jubilea Kongreso; 3. IV. pri Aliĝo de 16 ministroj al la Pariza Konf. kaj pri Kongreso en Tallinn; 4. IV. pri Brazila Kongreso k. Poŝtmarkoj, Jubilea Kongreso k. Tib. Morariu; 14. IV. granda artikolo pri Majstro Zamenhof; 16. IV. Pola mapo kaj gvidlibro tra Varsovio kaj Kap. Jan Silhan el Lwów.

ŁUKÓW. — S-ro Mgr. St. Łotocki gvidas kurson de Esperanto por 20 gimnaziaj lernantoj. — Ĝisnuna entuziasmo inter aŭskultantoj esperigas tre bonan rezulton.

RADZIECHÓW. — Kursgvidis la konata Lwów'a Ĉe-instruistino Fanjo Steiger kun bona rezulto.

SIEDLCE. — Esp. vivo ĉi tie apenaŭ vivetas. — Malgraŭ eksterordinara malmultnombreco de esperantistoj oni povas renkonti ilin regule ĉiumerkrede de 7 ĝis 9-a horo vesp. en kafejo „Adria" (str. Piłsudskiego Nr. 16). Trapasantaj samideanoj estas bonvenataj.

WARSZAWA.— La 16-an de marto okazis ĝenerala jarkunsido de Varsovia Esperantista Societo. Laŭ la raporto de prezidanto s-no I. Dratwer la Societo gvidis multajn kursojn, aranĝis diversajn prelegojn, klubvesperojn ktp. La Societo aperigis multajn komunikojn en la urba gazetaro. La ĝenerala jarkunsido aprobis la agadon de la Estraro. En novan Estraron oni elektis s-anon I. Dratwer, — prezidanto, s-anon F. Kuriański — vicprezidanto, s-anon A. Kerner — sekretario, s-aninon E. Pasztejn — kasistino, s-aninon B. Neufeld — bibliotekistino, s-anojn M. Płońskier kaj J. Markowski — estraranoj. — La 13-an de aprilo dum klubvespero parolis s-ano Tiberio Morariu „Pri spertoj de propagandisto". Ĉeestis 25 pers. — La 18-an de aprilo okazis solenaĵo sur la tombo de Zamenhof. En la nomo de V. E. S. parolis prezidanto s-no I. Dratwer. Ni notu, ke la solenaĵon partoprenis preskaŭ ekskluzive membroj de V. E. S., kiu kiel ĉiujare invitis siajn membrojn kaj aliajn esperantistojn al la solenaĵo. — La 20-an de aprilo V. E. S. aranĝis en sia ejo Zamenhofan Festvesperon. Parolis s-noj J. Forge, D-ro W. Róbin, Tiberio Morariu kaj I. Dratwer. En la koncerta parto partoprenis s-aninoj B. Słuszna (deklamo), M. Kuriańska (pianludo) kaj s-no A. Glezer (deklamo). Malgraŭ, ke pro la miskompreno gazeto aperigis komunikon la sekvontan tagon la Festvespero tre sukcesis kaj ĝin partoprenis pli ol 50 pers. — En V. E. S. komenciĝis kurso, kiun gvidas s-ano T. Morariu. — La 14-an de aprilo en la gazeto „Nasz Przegląd" aperis granda artikolo de s-ano I. Dratwer: „En dudekjaro de morto de la Majstro". Adreso de V. E. S. — Zielna 29/10, tel. 271-43, mardoj kaj vendredoj 20—22.

WILNO. — Lasttempe nian lokan Esperanto-movadon eniris plivigliĝo. Ĉiuj ekzistintaj ĝis nun grupoj decidis revivigi la Societon „Universo", kiu de nun estos la sola Esperanto-Societo, gvidonta ĉian ajn poresperantan laboron en nia urbo.

La novelektitan komitaton eniras: D-ro A. Goldburt (prezidanto), D-roj A. Gurviĉ kaj W. Perlman (v.-prez.), s-ro K. Gerŝater, s-ano S. Ŝik (kasisto), A. Brudno, J. Ŝuster (sekretario). L. Subotnik (II-a sekret.), F. Alperoviĉ kaj s-anino Slava Aron.

La revizian komisionon eniras: s-ro Zalmanson, s-ino Gerŝater, s-anino Lapido, s-anoj Gajfen kaj Bregman.

— La 12. III. „Universo" okazigis tekunvenon dediĉitan al la 80 jara naskiĝtago de Antoni Grabowski. Pri la vivo, literatura agado kaj nobela persono de nia II-a Majstro parolis s-anoj L. Subotnik, Ŝuster kaj Gerŝater. Fragmenton el „S-ro Tadeo" laŭ majstra traduko de Grabowski parkere recitis s-ano Bregman. Kelkajn poemojn de Grabowski laŭtlegis D-ro Gurviĉ.

Tiamaniere ni honoris nian meritplenan pioniron.

— Okaze de la 20 jara mortotago de nia kara Majstro, „Universo" aranĝis funebran solenon en la ejo de Juda Kuracista Asocio. La malfermon faris la prezidanto D-ro Goldburt, kiu priparolis la signifon de ĉi tago kaj ankaŭ atentigis pri la nuna malkonvena tempo, en kiu labori en spirito de Zam. estas tiel malfacile. S-ro Gerŝater, en sia judlingva parolado, skizis la evoluon de internacilingva problemo kaj konkludis, ke Esperanto, la genia verko de D-ro Zamenhof, estas la ĉiuflanke taŭga helplingvo, ne timanta konkurantajn. La duan parton de la soleno partoprenis s-ino Porozowska (el Bjalistoko), kiu deklamis „En tago malluma" de Leo Belmont kaj „Mia penso" de Zamenhof. S-ano Alperoviĉ deklamis „Funebraj eksonas tra l' mond' sonoriloj" de F. Hiller. La originalajn tekstojn antaŭis judlingvaj tradukoj faritaj de L. Subotnik. Per la „Espero" ludita de blinda violonisto Z. Piernik (li ludis ankaŭ aliajn muziknumerojn) estis finata la impona soleno. En la salono de la soleno estis aranĝata ekspozicio koncernanta la personon de Zamenhof, fare de s-ano Ŝik.

Okaze de la 20-a mortotago de nia Majstro la Vilna juda gazetaro lokigis artikolojn pri Zamenhof kaj detale raportis pri nia funebra soleno al Lia honoro.

— „Universo" entreprenas korespondan kurson por la urbo kaj provinco.

— Okaze de la jubilea jaro kaj kongreso „Universo" entreprenas akcion pri nomigo de strato en nia urbo je l' nomo de nia Majstro.

P. S. Dumtempa adreso de „Universo" estas D-ro A. Goldburt, ul. Ostrobramska 20.

KURSGVIDANTOJ atentu! Ni helpos al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapest VIII. Mária-u 34.

Katalogon petu de la admin. de „Pola Esp."

En iu tago...

(noveleto)

Mi kuŝis sur la tabullito kaj ŝajnigis, ke mi dormas, sed mi lin ne delasis de okuloj eĉ por unu monento, rigardante lin tra la duonfermitaj palpebroj. Estis io maltrankviliganta en lia sinteno, kion mi neniam ĝis nun rimarkis; li leviĝadis for de la tablo kaj promenadis de angulo al angulo, subite li senmoviĝadis ĉe la fenestro, alpremadis frunton al la vitro kaj denove sin turnadis al la tablo kaj tie sidiĝis, enpensiĝinte.

Mi vidis precize — lia vizaĝo estis pala, liaj manoj tremis. Li skribis rapide kaj ofte ĉesadis por reveni al la fenestro. Trans la fenestro pluvis, jam de kelkaj tagoj forestis la suno. Li denove sidis ĉe la tablo. Lia hartufo estis tauzita, la haroj falis sur la frunton, malsekan de ŝvito. Dum li apogis sian kapon kaj longe rigardis en la malhelan angulon de la ĉambro, en kiu la disŝirita tapeto pendis nudigante flavan muron, mi ekvidis, ke liaj okuloj estis plenaj de larmoj.

Mi ne scias, ĉu li ŝajnigis, ke min ne rimarkas, aŭ ĉu li forgesis tute mian ekziston, — mi lin neniam vidis dum tiel stranga stato. Ekkaptis min malkomprenebla timo, mi eksentis malvarman tremon en mia korpo; mi kuŝis senmove, mi timis laŭte spiri. Kion ĉio ĉi signifis? Mi divenis, ke ion teruran, al mi nekonatan: mi sentis la teruron; al mi ŝajnis, ke mi enspiras la odoron de la disfosita freŝa tero. Mi silentis.

Li prenis el la tirkesto nigran ŝtalan objekton, iam mi ĝin vidis. Li trankviliĝis tuj. Li staris senmove antaŭ la spegulo kaj turnis la pafiltubon al la tempio. Mi rigidiĝis, rigardante lian vizaĝon — li milde kaj kviete ridetis; sole la larĝigitaj pupiloj transbriligis la internan lumon.

Liaj lipoj moviĝis sensonore, sed mi povis tralegi vortojn, kiujn li ne elparolis.

— Jen ĉio, — li flustris, — jen ĉio — la vivo fariĝis pli malbona ol la hunda vivo, — nenio jam plu okazos.

Mi komprenis, ke ekestos tuj ia teruraĵa krimo, se mi ĝin ne malhelpos. Subite mi ekleviĝis de la tabullito, kaj ĝemante mi eksaltis al li; mi ekkaptis per miaj dentoj lian malsupren pendantan manon, mi ĉirkaŭprenis per manegoj liaj genuojn: mi ne povis eligi la voĉon de mia gorĝo. Li ektremis. Li forĵetis la revolveron kaj sin turnis al mi.

— Ho, vi karulo...

Li ĉirkaŭprenis mian kapon kaj longe rigardis miajn okulojn. De liaj okuloj elfluis larmoj.

— Ho, vi, — li diris, — mia kara hundo...

Mieczysław Braun.

LEO BELMONT.

Szum, wichrze, szum!

Szum, wichrze, szum, a szum, a wiej!
Z oddali nieś bezsłowną wieść...
Zagłuszaj ból tęsknoty mej
I rozpalone czoło pieść...

Dalekim jest mi cały świat,
Lecz jam od świata tego zbiegł...
Samotność — to okrutny jad.
Samotność — to czarowny lek!

Z nieopublikowanych polskich manuskryptów z 1923 r.

LEO BELMONT.

Ho, bruu, vent'!

Ho, bruu, vent'! Sciigon portu
Senvortan el la malproksim'...
Karesu mian ardan frunton,
Prenu sopiron de l' anim'...

Mond' tuta estas al mi fora,
Sed mi de l' mond' forkuris mem...
Solec' — medikament' mirakla,
Solec' — kruela la venen'!

Tradukis Halina Weinstein.

El la polaj nepublikigitaj manuskriptoj el 1923 j.

EL POSTMORTA PAPERUJO DE JAN KASZYCKI.

HENRYK SIENKIEWICZ.

La preĝo de arbaro

La suno kliniĝis al subiro. Tra folioj kaj pingloj de pinoj traiĝadis ĉiam pli k. pli ĝiaj ruĝaj radioj, kovrante la grundon arbaran per grandaj, oraj makuloj. La aero estis seka; en okcidento disverŝiĝadis jam granda vespera ĉielruĝo, kvazaŭ maro de fandiĝinta oro kaj sukceno. La silenta, verma vespero printempa flamis sur la ĉielo.

En la arbaro ĉesis malrapide la taga laboro. Silentiĝis la frapado de pego; nigraj kaj brunruĝaj formikaj vicoj post vicoj revenadis al siaj ejoj. Inter la kuracaj herboj vagadis tie kaj ie malgranda nigra, arbara abelo kaj plenigis la lastan ŝarĝon de miela poleno. El la fendoj de krevita ŝelo arba komencis eliradi en la mondon malserenaj kaj tage blindaj noktaj papilioj; la kuloj ekkantis sian malgajan kanteton. Sur arboj serĉadis la birdoj la pornoktan lokon. Iame ekfajfis la flavbeka merlo aŭ ekklakis per flugiloj la kornikoj, kiuj, sidiĝinte sur unu arbo, ekkverelis inter si pro la plej oportunaj branĉoj. Sed tiuj voĉoj estis ĉiam pli maloftaj kaj ĉiam pli mallaŭtaj. Ĉio ĉesadis malrapide, nur la brueto de la arboj interrompadis de tempo al tempo la silenton. La avelujo levis siajn foliojn supren; la kverko-reĝo murmuris mallaŭte aŭ plendis la betulo per siaj branĉoj. — Silento.

Sed jen la betulo fariĝis ankoraŭ pli ruĝa, kaj oriente mallumiĝis la densa ĉielbluo. Do jam ĉiuj arbaraj bruoj kunfandiĝis en seriozajn kaj mallaŭtajn kvankam grandegajn ĥorojn. Jen la arbaro, antaŭ ol dormi, ripetas sian antaŭnotkan preĝon. La arboj rakontas al la arboj la gloron Dian, kaj vi dirus: ili interparolas per homaj paroloj.

Ho! nur tre senkulpaj animoj komprenas ĉiu tiun gravan kaj benatan parolon. Ho! nur tre senkulpaj koroj aŭdas kaj komprenas, kiam la unua ĥoro de patroj-kverkoj tiel komencas:

Fratinoj pinoj, ĝoju! Jen Sinjoro donis al ni la silentan, varman tagon, kaj nun la stelplenan nokton faras sur la tero. Granda estas Sinjoro, kaj forta, kaj pli forta ol ni, kaj boneca, do estu gloro al Li en la altaĵoj, sur akvoj, herbejoj kaj en la aeraj vastaĵoj!

Kaj la pinoj meditadas momente la parolojn de la kverkoj, poste diras konsente kun la ĥoro:

— Kaj jen, Sinjoro, por gloro Via, kvazaŭ poroferajn incensilojn ni eligas la bonodoran balzamon kaj fortan, tre fortan aromon rezinan. Patro nia, kiu estas en la ĉieloj, sanktiĝu nomo Via!

Kaj poste la betuloj:

La vesperaj ĉielruĝoj brulas sur la ĉielo, ho Sinjoro, kaj en iliaj briloj niaj folietoj iĝas oraj kaj flamaj. Do per niaj oraj folietoj ni faras kanton por Vi, ho Sinjoro, kaj niaj maldikaj branĉetoj ludas, kiel harpoj, ho bona Patro nia!

Kaj la malĝojaj piceoj:

— Sur nian malserenan frunton lacigitan de sunvarmego falas la vespera

roso. Gloro al Sinjoro! Fratoj kaj fratinoj, ĝoju, ĉar falas la vespera roso.

Kaj meze de tiuj ĥoroj nur unu tremolo tremas timeme, ĉar ŝi donis la lignon por la kruco al la monda Savinto, kaj iame nur ekĝemas mallaŭte:

— Sinjoro, kompatu min!

Kaj iatempe, kiam la kverkoj kaj pinoj eksilentas momente, de iliaj piedoj leviĝas la mallaŭteta, timema voĉo, mallaŭta kiel zumado de kulo, mallaŭta kiel silento mem. Tiu voĉo kantas:

— La bero mi estas, ho Sinjoro! malgranda kaj en musko kaŝita. Sed vi ekaŭdos min, rekonos kaj ekamos, ĉar kvankam tre malgranda, mi estas pia kaj kantas por gloro Via!

Tiel preĝas ĉiuvespere la arbaro kaj ĉiela kapelo supreniĝas ĉiuvespere de la tero al la ĉielo kaj flugas alten, alten, ĝi tie, kie ekzistas jam neniu estaĵo, kie estas jam nenio, nur la arĝenta polvo stela, kaj laktoblankaj strioj kaj steloj, kaj super la steloj — Dio!

Esperantigis

Jan Kaszycki

INTERESA PROJEKTO

(Libervola Helpservo Internacia 1937)

Ekvidinte la sukceson de l' esperanta broŝuro pri la Internacia Helpservo, kelkaj samideanoj proponis ke speciala Servo por Esperantistoj estu organizata dum la somero 1937, almenaŭ dum kelkaj semajnoj. Tiu sperto provus, ke Esperanto kiel bone taŭgas por la ĉiutaga vivo, por praktika laboro, kiel ĝi taŭgas ĉe kongresoj internaciaj.

La Internacia Helpservo alvokas al kunlaboro! Ĝi bezonas internacian lingvon, ĝi bezonas nian fervoran subtenon. Kaj ni, Esperantistoj, bezonas okazon por uzi praktike nian lingvon, por efektivigi nian celon, kiu estas ne teoria, sed nepre praktika. Esperanto estas helplingvo, ĝi estis kreata por helpi. Ni do iru kaj per ĝi helpu tie, kie ĝi estas bezonata!

Samideanoj! Se vi deziras labori samtempe por Esperanto kaj por la Paco, rezervu kelkajn tagojn el via somera libertempo por Internacia Libervola Helpservo! Legu nian broŝuron, kaj skribu al unu el la malsupre indikitaj adresoj por subteni la aferon! Estas ankoraŭ nur projekto, sed ĝi devas efektiviĝi. Pluaj informoj sekvos poste.

La dua eldono de nia broŝuro, kun belaj bildoj kaj antaŭparolo de Samideano Edm. Privat, estas havebla kontraŭ nur unu respondkupono, ĉe:

Jules Gilliard, Place du Marché 3, **Annemasse** (Haute Savoie, Francujo),

Eric Descoeudres, Sonnhalde 6, **Bienne** (Svislando).

LA TRIOBLA FESTJARO DE HUNGARUJO

Laŭ la decido de Lia Sankta Moŝto, la XXXIV Eŭĥaristia kongreso dum 1938 kunvenos en Budapeŝt. Dum la sama jaro jubileos la hungararo la 900-an mortdatrevenon de sia unua kaj apostola reĝo Sankta Stefano kaj aranĝos la XX-an Mondkongreson de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. La solenaĵojn antaŭpreparas La ACTIO KATHOLIKA kaj en tiu kadro la Hungarlanda Katolika Esperanto Societo! La Eŭĥaristia Kongreso okazos en majo, la solenaĵoj de Sankta Stefano en aŭgusto kaj la Mondkongreso de IKUE verŝajne tuj post la Eŭĥaristia Kongreso, aŭ antaŭ la St. Stefana-solenaĵoj.

La Hungarlanda Katolika Esperanto Societo kun streĉita forto laboras, ke kiel eble multe da katolikoj lernu nian karan lingvon, por ke la vizitantoj de solenaĵoj senpere povu interrilati kun iliaj religiofratoj hungaraj. La protektadon de la Societo bonvolis akcepti la religia ministro **Homan Bálint** kaj la plej altan honorprezidantecon, lia princprimata moŝto **Serédi Jusztinian.** En la ekleziaj rondoj regas grandega interesiĝo pri esperanto. Multaj pastroj lernas la lingvon kaj pastro **Francisko Zsiros,** redaktoro de la plej disvastiĝinta kaj plej katolika semajna revuo, la „SZIV" (organo de la SANKTA KORO DE JEZUO SOCIETO) ĉiusemajne aperigas favorajn artikolojn pri esperanto kaj pri ĝia grandega valoro koncerne la intereson de la eklezio. Parlamentano **Petainek József,** landa prezidanto de la Hungarlanda Katolika Es-

peranto Societo, celas enkoduki ĝeneralan atakon sub la devizo „Esperanton en la lernejojn" ĉi tiucele serĉas interrilatojn kun ĉiulandaj parlamentanoj esperantemaj. Do vigla laboro regas en la hungaraj katolikaj rondoj kaj favora vento akcelas la antaŭeniron de nia ĝenerala revo. — Laŭ la proverbo: „Frapu la feron, kiam ĝi ardas", rapidu helpi al la hungarlanda katolika esperantistaro! Sciigu la adresojn de esperantemaj pastroj kaj parlamentanoj. Propagandu inter tiuj, kiuj intencas viziti Hungarojon, ke ili lernu esperante, ĉar per ti'es helpo ili povos bone kaj facile interkompreniĝi dum la solenaĵoj kaj petu la direktoron de la HUNGARA RADIOSTACIO, Budapest, Sándor u. 8. ke ĝi disaŭdigu esperantlingve pri la hungaraj vidindaĵoj kaj sciindaĵoj.

Bonvolu traduki ĉi tiun komunikaĵon ankaŭ nacilingve, kaj publikigante ĝin en nacilingvaj gazetoj sendi la eltranĉaĵojn al la Hungarlanda Katolika Esperanto Societo, leteradreso: Budapest, Petöfi Sándor u, 9. IV. 3.

KOMUNIKO DE UEA.

La Ĉefdelegito de U.E.A. por Polujo informas nin, ke la Jarlibro de UEA por la jaro 1937 aperos komence de junio n. j. kaj estos dissendata al ĉiuj pagintaj membroj.

La Jarlibro pro la Jubileo de Esperanto enhavos krom la informa materialo ankaŭ interesajn artikolojn, rilatantajn al nia movado 1887—1937 kaj ilustraĵojn.

PETO!

La **Hungarlanda Katolika Esperanto Societo** (leteradreso, Budapest, Petöfi Sándor u. 9. IV. 3.) eldonas ekde januaro 1937. dulingvan revueton: **„Katolikusok Csillaga. Katolika Stelo"**, celante propagandon kaj informadon.

La redakcio petas la tutmondan katolikaron, bonvolu informi ĝin pri ĉiuj okazintaĵoj, kiuj taŭgas por interesi ankaŭ alilandajn katolikojn.

La redakcio kun danko akceptas artikoletojn (ĝis 1000 vortoj) pri nuraj katolikaj temoj.

ALVOKO AL KUNLABORADO.

La Redakcio petas insiste:

a) literaturemajn legantojn pri kunlaborado per regula alsendado de originalaj kaj tradukitaj literaturaĵoj.

b) propagandistojn pri verkado de artikoloj koncernantaj la problemojn de esperantista movado,

c) estrarojn de societoj apartenantaj al P. E. D. pri regula sendado de raportoj kaj koncizaj notoj pri la agado de siaj grupoj. La enhavo de la komunikaĵoj estu vere esenca. Oni evitu troadon, panegiraĵojn, personajn reklamojn k. s.

Se vi deziras, ke „Pola Esperantisto" estu interesa legaĵo por ĉiuj kaj inde reprezentu la landon de la Jubilea Kongreso, provizu ĝin per leginda materialo!

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto" uskuteczniać można na konto PKO Nr. 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29.** co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą; fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 7 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł.30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anoncoj de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 29. — KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.

Drukarnia Leopold Dudek i Ska w Krakowie, Stolarska 6. Redaktor odpowiedzialny: Dr. Leon Rosenstock.